

— Ne ploru, gefiloj! La Fatalo, igante la Tempon ĉiam kaj ĉiam rondmarŝi, necese revenigos lin. Tiun ĉi jaron li alportis al vi neforgeseblan semajnon. Ĉiujare li renaskos por vi similan, eĉ pli belan se eble!

Por la homaro, brilu l' Esper'!

RENÉ DE LAJARTE.

## II

### AL LA GARDENURBO

Ĉio, kio povas faciligi la homan vivon, kio povas plibonigi la homan sorton, interesas la Esperantistojn. Jen kial ekskurso al la fama ĝardenurbo, kie oni organizis sanajn, agrablajn, gajajn, komfortajn loĝejojn por la laboristoj, speciale nin allogis.

Preskaŭ 600 kongresanoj aĉetis biletojn por tiu vizito, kaj, ĉar oni nur esperis, ke venos ĉirkaŭe 300, ni lastmomente ektimis, ke ĉiuj ne trovos lokojn en la vagonaro. Sed la Angloj — ni tion nun sperte scias — estas elturniĝemaj, kaj la fervoja kompanio rapide plimultigis la necesajn vagonojn.

Posttagmeze de la 13 de Aŭgusto, ni alvenas al Letchworth, kie nin atendas afablaj gvidantoj parolantaj nian lingvon, S<sup>oj</sup> F. W. Rogers, Edgar Simmons kaj Ebenezer Howard la ĉefaranĝinto de la urbo.

Oni dividiĝas en tri rotoj.

La unua, sekvanta *blankan* flagon, vizitis la novan « klostron », kiun konstruigis nia bona samideanino F<sup>ino</sup> A. Lawrence por fariĝi plenaera lernejo ne por knaboj, sed por viroj kaj virinoj. Tie la plenkreskaj lernantoj instruigas pri la perfekta korpa kaj spirita vivo, pri la vera aplikado de la antikva sentenco : « mens sana in corpore sano ». Kaj eĉ niaj anglaj amikoj — tamen jam tiel spertaj pri tiu grava demando — treege interesiĝis de tiu por ili tute nova vizito.

Antaŭirata de *ruĝa* flago, la dua roto detale vizitis la laboristajn domojn konstruitajn de la « Garden City tenants ». Tie ĉiu laborista familio posedas ĉarman dometon kun ĝardeno; kaj, kiam la viro revenas lacigita de la laboro, anstataŭ trovi hejmon malkomfortan, haladzantan, malpuran, senaeran, kiun li volonte forlasas por iri al la drinkejo, li eniras gajan, puran loĝejon kaj povas ripozi meze de la bonodorantaj floroj de sia ĝardeneto.

La *verda* flago promenigis la trian roton tra duon-kamparo, kies freŝan verdecon la neanglaj samideanoj mire admiris. Tro ofte, kiam oni neniam iris Anglujon, oni imagas tiun landon droninta en nebuloj kaj nigraj karbaj fumoj; kaj ĝi estas vera surprizo trovi, anstataŭ tia infera lando, la ĉarmajn verdajn pejzaĝojn de la anglaj paŝtejoj, herbejoj, ĝardenoj.

Je la kvina ni kunvenas por temanĝo ĉe la bone organizita bufedo de S<sup>o</sup> Dudley Johnson, kaj la afabla mastro de la lando S<sup>o</sup> Ebenezer

Howard faras al ni, en kortuŝanta maniero, belan esperantan alparolon, kiun ni tute represas, laŭ la « Cambridge Daily News », pro ĝia graveco kaj treega intereso.

Amikoj de la juna lingvo! — diris S<sup>o</sup> Howard. — En la nomo de la amikoj de la juna Urbo mi korege salutas vin. Esperanto kaj la Ĝardenurbo estas ambaŭ enkondukantoj de nova kaj pli alta kondiĉaro — kondiĉaro de paco kaj interkonsento. Plej ĝoje, do, mi volas sciigi al vi, dank' al nia kara juna lingvo Esperanto, ion pri nia kara juna Ĝardenurbo. Mi tion faras neniel dubante, ke, same kiel Esperanto estas nepre difinita por fariĝi universale komprenata lingvo, tiel ankaŭ la fundamentaj principoj de la ĝardenurba entrepreno estos iam aplikataj en la tuta mondo.

Ĝardenurbo celas efektiviĝi en la sfero de la aferoj tion saman, kion celas Esperanto en la sfero de la lingvoj.

Aĉetinte, antaŭ kvar jaroj, novan bienon kaj ĝenataj per nenia rutino, ni penadis konstrui ĉi tie novan urbon por la bono de ĉiuj.

La fundamentaj principoj de Ĝardenurbo, same kiel la gramatikaj reguloj de Esperanto, estas tre malmultaj kaj tre facile kompreneblaj.

La unua principo estas, ke la tero, sur kiu staras la urbo, devas aparteni al ĝiaj loĝantoj. Por grade atingi tiun rezulton, la kompanio limigas siajn dividendojn je kvin procentoj, kaj la restantan profiton ĝi elspezas nur por plibonigado de la urbo. Plie la kompanio promese trudis al si, ke, en iu venonta tempo, ĝi transdonos la tutan aferon al la « Trusto », kiu riprezentas la loĝantaron. « La tero al la popolo » jen la unua regulo de la ĝardenurba gramatiko.

La dua principo estas, ke la urban vivadon, kun ĝiaj societaj bonajoj, oni devus kombini kun la kampara vivado, kun ĝiaj beleco, dolĉeco kaj freŝeco. Por tion efektiviĝi, ni instalas nian urbon en la centra parto de la aĉetita bieno, kaj ni ĉirkaŭigis ĝin per ĝia propra zono da kulturigita tero. La utilo de tiu ĉi sistemo estas tre granda. La kulturigita bienparto posedos, ĉe la kreskado de la urbo, sian propran naturan vendejon. Fruktoj, legomoj kaj lakto ne devos esti transportitaj malproksimen, sed estos ĝuataj de la urbanaro mem. Aliflanke la laboristoj havos ĉiam proksime de si kamparon, kie ili povos ĝuadi la trankvilon kaj ripozon, kiujn liveras la Naturo. Plie ili povos alternigi sian laboron en la fabrikoj kun laboro sur kampo aŭ en ĝardeno. « Edziĝo de la urbo kun la kamparo » jen nia dua principo.

La tria principo estas jena: altiri, kvazaŭ per forta magneto, la homojn el la tro dense loĝitaj urboj al regionoj de la lando, kie kontraŭe la loĝantaro estas tro malmulta, por ricevi la profitojn, kiujn liveras kunigo. Tiamaniere nia agado albatas samtempe du malfeliĉojn: trodensiĝo de la urboj kaj maldensiĝo de la kamparo. La precipaj allogaĵoj, per kiuj ni celas altiri la homojn el la tro grandaj urboj estas: unue laboro laŭ sanecaj kondiĉoj, due loĝejoj malkaraj kaj proksimaj de la laborejoj, trie rimedoj por ludado kaj amuziĝo.

Permesu, ke mi traktu aparte tiujn ĉi lastajn punktojn iom pli detale.

*Saneca laboro.* — Parton el la urbo oni difinis por fabrikoj kaj laborejoj. Tiuj ĉi estas lokitaj apud la fervojo, kaj, ĉar oni aĉetis la teron tre malkare, oni konstruis la fabrikojn teretaĝe, kio ŝparas monon kaj havigas sufiĉegon da lumo kaj aero. Krom tio, ĉar tiuj konstruaĵoj staras sur grandaj terpecoj, ili havas apud si multajn liberajn lokojn por plivastigo. Jam tie ĉi oni instalas kvar presejojn, du bindejojn, unu maŝinfabrikon, fabrikojn de asfalto, de svisaj brodaĵoj, de mineralaj akvoj kaj de fotografaj paperoj, krom la laborejoj de la Ĝardenurba kompanio por provizigi akvon, gason kaj elektran forton.

*Domoj.* — Oni jam konstruis grandan nombron da dometoj por laboristoj, kies plimulto troviĝas proksime de la fabrikoj. Aparta konstrua kompanio ludonas, po 5 ŝilingoj kaj 2 pencoj semajne, dometon kun tri dormoĉambroj, sufiĉe vasta salono, kuirejo, banejo, ĝardeneto, k. c.

*Ludado kaj amuziĝo.* — Proksime de la stacio estas granda placo de sesdek-kvin akroj kaj parko de sepdek akroj; en la kampara zono estas kampoj por golf-, kriket- kaj piedpilk-ludoj. Ekzistas ankaŭ publika halo por koncertoj, paroladoj, kunvenoj, teatraj prezentadoj, baloj, k. c. Apud la halo estas knab-

ina klubejo; ĉe « Skettles Inn » (keglara gastejo) estas bilardo, legejo, kegloludejo, k. c.

La urbo, kvankam ĝi nun enhavas nur 4000 loĝantojn (kio estas la okono de la ebla estonta loĝantaro), estas plena de viveco kaj aktiveco.

Sed ĉefa afero, kiun oni ankoraŭ bezonas, estas, ke ĉiuj ĝardenurbanoj sciu la lingvon Esperanto, por ke ili povu korege bonvene saluti per la kara lingvo ĉiujn, kiuj alvenos el la transmaraj landoj al la juna urbo!

Apenaŭ ĉesis la entuziasmaj aplaŭdoj, kiujn naskis tiu elokventa parolado, kiam alvenis polvokovrita aŭtomobilo kun la verda standardo. El ĝi malsupreniras nia kara gaja amiko D<sup>o</sup> Geo Cunningham akompananta S<sup>inojn</sup> Zamenhof kaj Sebert. Tra la bela lando, la aŭtomobilo survoje iom perdiĝis kaj fine alvenis tro malfrue! Domaĝe! kaj S<sup>o</sup> Howard volis elŝiri siajn harojn, tial ke li ne atendis S<sup>inon</sup> Zamenhof kaj nian faman Trianon por paroli! Rapide nia samideano S<sup>o</sup> P. D. Hugon, sekretario de la ĝardenurba esperantista grupo, kondukis nian afablan majstredzinon tra la urbo, kaj baldaŭ sonis la horo por reveturo al Cambridge.

Kaj revenante, dum mi admiris tra la vagonfenestreto la ruĝajn radiojn de la subiranta suno reliefigantajn la verdajn arbojn per violkoloraj ombroj, mi pensis: « Jen eble la Esperantistujo estonta, pri kiu revas nia amiko Aymonier! »

KARL FUCHS.

### III

#### AL LA KATEDRALO « ELY ».

Merkredon 14 de Aŭgusto, speciala vagonaro kondukis ĉirkaŭ 400 kongresanojn ĝis « Ely ». Tiu ekskurso kaj tiu al « Letchworth », kiu okazis la antaŭtagon, estis tute malsamaj. Sendube, dum la vagonaro rapide transiris la 25 kilometrojn, kiuj estas inter Cambridge kaj Ely, la fakoj, kun gajaj vojaĝantoj, prezentis la saman vidaĵon. Sendube ankaŭ vere gasteman akcepton ricevis la vizitantoj, kiuj devas precipe danki siajn afablajn gvidintojn: la Dekanon Kennett, la Pastron I. Crosby kaj la sindoneman P<sup>on</sup> I. C. Rust. Sed la granda kontrasto inter la du vizititaj lokoj estas kurioza: Dum la kongresanoj en la Ĝardena Urbo vidis unu el la « urboj de morgaŭ » kaj eble imagis la estontan vivon de niaj posteuloj, la estintecon memorigas « Ely » kaj ĝia mirinda katedralo, kies granda tegmento, altaj turoj, fiere staras super la malaltaj domoj de la kvieta urbo.

Ely estas la ĉefurbo de la lando nomata « Insulo de Ely », fama en la angla historio. Tiu lando ne estas vera insulo, kvankvam tri riveroj (« Ouse, Wash, Neve »), preskaŭ ĉirkaŭas ĝin. Sed tie, kie estas nun belaj kulturoj, estis, longan tempon antaŭe, sovaĝaj marĉejoj, kovritaj per kanoj, kies eniro estis tre malfacila. Tien, kiel en vastan fortikigitan tendaron, multfoje rifugiĝis la enlanduloj, por kontraŭbatali la fremdajn (Danajn, Normandajn...) ekokupadojn. El la diversaj partoj de la lando, ili alkuris ĉirkaŭ la faman monaĥejon, fonditan en 673 de la Sanktulino « Audrey », regino de Northumbria lando, kaj okupata, de post 970, de Benediktaj Monaĥoj. Ekzemple, dum Gulielmo la Bastardo, « la Almilit-